Humboldt-Universität zu Berlin

# Lingva justeco: Optimumaj minoritataj rajtoj kaj ilia realigo

Bengt-Arne Wickström

Labordokumento n-ro 16-5

REAL

Esplorgrupo «Ekonomiko, politikanalizo kaj lingvo»

# Lingva justeco: Optimumaj minoritataj rajtoj kaj ilia realigo*

Bengt-Arne Wickström†

**Resumo**

Perfekta lingva justeco estas interpretata tiel, ke ĉiu individuo havu la rajton uzi sian preferatan lingvon en ĉiu socia situacio. Tiu idealo tamen kolizias kun la reala mondo, kaj pro kostoj kaj aliaj administraj kialoj oni devas limigi la lingvorajtojn for de la idealo. Principe oni povas eltrovi, kiom alte ĉiu individuo taksas havi certan rajton por sia lingvo, adicii tiujn taksadojn kaj kompari la sumon de la individuaj taksadoj kun la kostoj por la socio pro la realigado de la rajto. Oni akceptu rajton, se ĝia taksita valoro superas la kostojn.

La kostoj normale facile kalkuliĝas. La laŭpersonaj kostoj normale malpliiĝas, se la nombro de ĝuantoj de la rajto kreskas. Pro tio optimuma regulo pri lingvorajtoj kondukas al tiel nomata «kritika maso» da ĝuantoj.

La difino de valoro multe pli malfacilas. Oni povas preni kiel elirpunkton la sumon de individuaj taksadoj kaj modifi ĝin. Tiaj modifoj necesas ekzemple se rajto pligrandigas la statuson de la lingvo kaj pro tio plialtigas la pagpretecojn, aŭ se rajto pligrandigas ontajn generaciojn de uzantoj de la lingvo. Tiuj modifoj pligrandigas la valoron kompare al la individua taksado. Pro tiu pligrandigo de la taksado oni havu pli da rajtoj.

Se egaleco en si portas socian valoron, la malavantaĝoj de anoj de malplimulto sen rajtoj por sia lingvo devas esti rigardataj kiel socia kosto. Tian koston oni devas kompari kun la kostoj de realigado de rajtoj. Ju pli grava estas egaleco, des pli da rajtoj oni havu. La leĝa realigo de lingvorajtoj postulas ne tro komplikajn regulojn, ĉar la administrado de komplikaj reguloj signifas altajn kostojn. Oni do trovu simplajn regulojn kaj kategoriojn.

Gravas ankaŭ la geografia strukturo de la ŝtato, kaj oni povas analizi malsamajn federaciajn strukturojn kaj trovi optimuman strukturon depende de la loĝlokoj de la uzantoj de diversaj lingvoj. Per manipulado de la federacia strukturo membroj de la plimulto povas klopodi diskriminacii la malplimulton. Indas trovi regulojn pri lingvorajtoj, kiuj minimumigas la diskriminaciajn eblecojn de struktura manipulado.

***Ŝlosilvortoj***

Lingvaj rajtoj, lingva justeco, efikeco, leĝo, federaligo, lingva diskriminacio

Tiu ĉi artikolo aperis kiel:

Wickström, Bengt-Arne (2016). «Lingva justeco: Optimumaj minoritataj rajtoj kaj ilia realigo». En: *Internacia kongresa universitato, 69-a sesio*. Eldonis José Antonio Vergara kaj Alexandre André. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio: 5–16.

*Parto de tiu ĉi artikolo estis skribita en la esplorgrupo «Ekonomiko kaj lingvo» en Berlino subtenita de la Eŭropa Unio pere de la sepa kadra esplorprogramo (projekto MIME – kontrakto 613344). Tiu subteno estas danke agnoskita.

†Andrássy-Universität Budapest
Esplorgrupo «Ekonomiko, politikanalizo kaj lingvo» (REAL)
Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino – AIS
Retadreso: *bengt-arne.wickstroem@andrassyuni.hu*